

aprilo 1972
65-a jaro
n-ro 796 (4)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Bon-
venon
al la
Post-
kongreso
en
Sanfran-
cisko!

Vi trovos

la laŭlandan statistikon de la membraro en 1971 (p. 78). La unuaj kvin plej grandaj landoj (laŭ la membronombroj) estas: por la kategorio "Individuaj Membroj" (nur 2,66% da kresko el la jaro 1970), Francujo, Britujo, Usono, Svedujo, F.R.Germanujo; kaj, por la kategorio "Asociaj Membroj", Bulgarujo, Hungarujo, Pollando, Jugoslavio, F.R.Germanujo.

S-ino Cathy Schulze, unu el la motoroj de la movado en Usono, kie la nombro de la individuaj membroj kreskis je 14,5% en unu jaro, priskribas (p.62-64) la nuntempan situacion de tiea movado, atendante laŭeble multnombran partoprenantaron al la 57a Universala Kongreso en Portlando (Oregono) kaj al ĝia Postkongreso en Sanfrancisko (Kalifornio).

Geografian trarigardon pri la lingvaj situacioj kompare kun la konsisto de la membraro provas la apuda ĉefartikolo.

La subita informo pri la morto de C.C.Goldsmith (p. 68), ne tre konata inter novaj membroj sed iama sindona direktoro de la Centra Oficejo, sendube igos multjarajn membrojn rememori pri liaj agadoj admirindaj.

Enhavo

- 61 Interkontinente (Sadler)
- 62 Motoroj de la movado en Usono (Schulze)
- 65 Recenzoj
- 65 Gajnu monon por UEA — kaj por vi mem
- 67 Por pli efika informado 8: Interpretado (Lapenna)
- 68 Nekrologoj: Goldsmith, Serrano, King
- 69 TEJO-paĝo
- 72 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 72 Leteroj de legantoj
- 74 Komenco bona — ĉio bona
- 74 Vojo kaj tempo (Kořínek)
- 75 Ĉu ni eksperimentu? (Christoffersen)
- 76 57a Universala Kongreso, Portland (Oregon), Usono
- 76 Ĉiam pli koncize
- 77 Esperanto en radio
- 78 Oficiala informilo: n-ro 455
- 79 Kreado de Scienca Tradukservo de UEA (Heck)
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

Sanfrancisko, senpolva urbo laŭ turistaj impresoj, kie okazos la ĉi-jara Postkongreso, havas — kiel konate — internacian karakteron kun enmigrintoj de diversaj nacioj.

En 1945 tie estis farita la baza interkonsento inter mondaj politikistoj pri la fondo de Unuiĝintaj Nacioj. En tiu monдохistorie grava urbo, kie regas veke freŝa aero kaj matene kaj vespere ankaŭ en somero, partoprenantoj de la Postkongreso povos ĝui ĝiajn programerojn, nun zorge preparatajn de la lokaj esperantistoj. Inter ili estos prezentado de Indiana Danc-Grupo. La du junulinoj en la foto, f-inoj Eulinda Toledo kaj Jane Talk, troviĝos en tiu prezentado inter aliaj por bonvenigi la anojn de la Postkongreso.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktorino: Nagata A.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 20,90; Suda Afriko, Azio, Sudameriko 14,30; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 11,—; Mezoriento, Nordafriko 7,70 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J.Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

INTERKONTINENTE

De tempo al tempo leviĝas voĉoj, laŭ kiuj la Esperanto-movado devus koncentri siajn fortojn al unu aŭ alia mondparto. En Eŭropo ni havas la plej bonajn ŝancojn — diras unuj. En Afriko estas nia estonteco — respondas aliaj.

Facile estus juĝi, ke ĉiuj kontinentoj estas egale gravaj. Ĉu la demando ne estas analoga al aliaj principaj problemoj de la movado: la problemoj, ĉu doni pli da atento al informado, al instruado aŭ al aplikado de la lingvo — aŭ la problemoj, ĉu pli gravas la ideologia, la kultura aŭ la praktika flanko de nia laboro? Kaj ĉu ni ne respondu analoge, ke necesas doni egalan atenton al ĉiu?

Multaj faktoroj influas

Tamen, se postrestas la instruado, ĝi tiam bezonas ekstran atenton. Kaj se la scienca literaturo postrestas kompare kun la beletra, tiam necesas aparte koncentriĝi je la scienca. Simile, la agado en unuopaj kontinentoj devas dependi de multaj faktoroj, ekz. de la relativa forteco de la jam ekzistanta movado, de la lingva situacio en la koncernaj landoj, de ilia politika influo kaj similaj aspektoj.

Eŭropo, kiu iam superregis la mondajn politikojn kaj ekonomiojn, estas hodiaŭ pli enfermita en si mem. La kreskantaj politikaj kaj ekonomiaj ligoj interne de la kontinento, la forte evoluanta turismo kaj la migrado de laboristoj de unu lando al alia sentigas forte la lingvan problemon ĉe ĉiuj tavoloj de la socio, des pli ĉar veturi eksterlanden preskaŭ ĉiam signifas veturi en alian lingvan teritorion. Eŭropo estis ĉiam fortikaĵo de la Esperanto-movado, kaj la relative alta viv-nivelo kaj ĝenerala klereco formas tre bonan bazon por la estonta progresigo de la Internacia Lingvo.

Amerikaj komparoj

Forte kontrastas kun Eŭropo la landoj de Latin-Ameriko. Ilin ĉiujn — kun unu grava escepto — ligas unu komuna oficiala lingvo: la hispana. Ĉar la lingvo de tiu escepto — Brazilo — estas la portugala, lingvo proksime parenca al la hispana, lingvaj problemoj aperas unuavice ĉe kontaktoj interkontinentaj, kiuj por la grandega plimulto de la popolo entute ne ekzistas. Krome, la problemoj de analfabeteco — preskaŭ 40% de la popolo — prezentas gravan bremsan al la instruado de fremdaj lingvoj. Dum en kelkaj landoj Esperanto havas fortikajn radikojn, en kelkaj aliaj ĝi apenaŭ ekzistas.

En Norda Ameriko la lingva situacio estas tre simila. Ankaŭ tie unu oficiala lingvo — la angla — superregas grandan parton de la kontinento, dum nur en parto de Kanado ĝi cedas antaŭ la franca. La insistado de la franclingvaj kanadanoj pri egalrajteco de tiu lingvo tamen kreis lingvan konscion, kiu povas esti favora grundo por Esperanto. Kontraste kun Suda Ameriko, la norda kontinento ĝuas altan nivelon de ekonomio kaj klereco, kio respeguliĝas ankaŭ en la Esperanto-

movado: UEA havas preskaŭ duoble pli da membroj en Usono kaj Kanado, ol en la tuta Centra kaj Suda Ameriko.

Azio, kun preskaŭ du trionoj de la monda loĝantaro — jam pli ol du miliardoj da homoj — estas la koloso el la kontinentoj, pri kiu ne eblas fari ĝeneralajn eldirojn. De la aziaj regionoj de Soveta Unio ĝis la tropikaj landoj kiel Indonezio, de Japanujo kun 2% da analfabetoj ĝis Afganujo kun 92% estas tiaj kontrastoj, ke paroli pri unu kontinento havas signifon nur en senco geografia. Ĝi estas tamen la kontinento plej postrestinta el vidpunkto de Esperanto. Kvankam la diverslingveco estas tre granda, la ebleco de eksterlandaj kontaktoj ekzistas nur por tre malgranda parto de la loĝantaro, kaj tiu eta elito iel elturniĝas helpe de la angla aŭ la ĉina. La plej urĝaj lingvaj problemoj de Azio estas la enlandaj problemoj de ŝtatoj kiel Hindujo, kiuj luktas por anstataŭigi, en siaj administraj kaj klerigaj sistemoj, la lingvojn de la antaŭaj koloniaj regantoj per la lingvoj indiĝenaj. Esperanto, en sia nuna stadio, apenaŭ povas ludi ian rolon en tiu lukto, kvankam ĝia fina rezulto devus esti avantaĝa por la Internacia Lingvo.

En Afriko, ĝenerale, simila lukto daŭras, kvankam tie komplikas ĝin la fakto, ke la afrikaj indiĝenaj lingvoj estas ankoraŭ malpli pretaj, ol la aziaj, por transpreni la rolojn de la eŭropaj lingvoj, kaj ke la ŝtataj limoj malofte koincidas kun la limoj de la lingvaj teritorioj.

En Oceanio, fine, la kreskanta komerco kun aziaj landoj komencas rompi la izolatecon de la du ĉefaj (anglalingvaj) landoj, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj kondukas al nova konsciiĝo pri fremdaj lingvoj.

Tiu lasta ekzemplo substrekas la fakton, ke la tuta situacio senĉese ŝanĝiĝas. Kio estas hodiaŭ valida strategio por la Esperanto-movado, povas esti post kelkaj jaroj jam malaktuala.

Adaptiĝi al regionaj kondiĉoj

La ĵusa superrigardo devus sufiĉi por montri, ke necesas adapti la strategion al la regionaj cirkonstancoj. Dum en unu kontinento oni emfazas la praktikan utilon de Esperanto ekzemple por turismo aŭ komerco, en alia mondparto necesas emfazi ĝian valoron por ĝenerala kleriĝo. Tio postulas inform-materialojn adaptitajn al la regionaj kondiĉoj. La postrestado de la movado en Azio kaj Afriko devenas ankaŭ de tio, ke preskaŭ komplete mankas informiloj adaptitaj al iliaj pensmanieroj.

Antaŭ 10 jaroj, 78,4% de la individuaj membroj de UEA estis en Eŭropo. Tiu procentaĵo ĉiujare mal-kresketis kaj estas hodiaŭ 75,4%. La vojo al ekvilibre tutmonda movado estas ankoraŭ longa, sed necesas ĝin sekvi obstine. En la epoko de interkontinentaj flugoj, Esperanto estu ne nur lingvo internacia, sed lingvo vere interkontinenta!

V.S.



En la ŝtato Kalifornio Esperanto estas instruata en pluraj lernejoj. En la foto: s-ino Minerva Rees instruas infanojn de Lernejo Spring Valley (urbo Millbrae), en la 5a kaj 6a lernejaj jaroj.

Pro multaj kialoj la 57a Universala Kongreso ne estos tipa. Unue ĝi estos pli malgranda — tial pli intima. Ĝi donos eblecojn pli bone koni la usonanojn. Willy Brandt, kanceliero de F. R. Germanujo, post kelksemajna vizito al Florido (Usono) konstatis pri Usonanoj jene:

"Impresis min la helpemo kaj amikemo, la interna forto de ordinaraĵ usonanoj — ne nur inter si sed ankaŭ al eksterlandaj vizitantoj . . . Kiom da ili laboras senpage, kiel volontuloj, en hospitaloj, infanvartejoj kaj en diversaj sociaj institucioj . . . La malpli granda ofteco de surŝoseaj mortoj spegulas la zorgemon de ŝoforoj unu pri la aliaj." (el ĵurnalo "San Francisco Chronicle", 1972-01-17)

La konstanta kongresa sekretario, Mikulaŝ Nevan, komentis pri la neformaleco inter infanoj kaj instruistoj en lernejoj, dirante, ke en multaj landoj infanoj montras respekton pro timo sed en Usono infanoj libere diras, se ne plaĉas al ili ekzemple lernejo. Tamen tre rimarkebla estas tolerema amemo inter instruisto kaj lernanto. Tio eble ŝajnas signo de malforto en nia sistemo kaj povas esti tia, sed ankaŭ tiu sendependa spirito estas parto de la usona nacia karaktero — tute nekonata en multaj landoj.

Esperantistoj tutmondaj interesiĝas pri la movado en granda lando, kia estas Usono. Dum la lastaj 20 jaroj nur kelkcent esperantistoj faris la tutan laboron, donis ĉiun dolaron por la disvastigo de Esperanto en Usono. Inter ili troviĝas eĉ ne unu riĉulo — nur ordinaraĵ civitanoj. Niaj buĝeto kaj laborforato estas, kompare al la grandeco de nia lando, mikroskopaj. Tamen, nun videblas solidaj gajnoj. Inter ili: —

Subtenoj de universitatanoj

Plej grava nun estas la aktiva apogo de respektataj universitatanoj: plej konata al la tutmonda esperantistaro estas d-ro Humphrey Tonkin, nun admini-

stranto de studentaj studoj en la Universitato de Pennsylvania (urbo Philadelphia); d-ro Jonathan Pool, profesoro de politika scienco, Universitato de Nov-Jorko (Stony Brook); d-ro Michael Ham, administranto de la prestiĝa Kolegio St. John's (Annapolis, Maryland); d-ro Richard Wood, profesoro de la germana lingvo, Ŝtat-Universitato Louisiana (Baton Rouge); d-ro Pierre Ullman, Universitato de Wisconsin (Milwaukee); d-ro Richard Trapp, profesoro de klasikaj lingvoj, kaj d-ro Lloyd O'Connor, administranto, Ŝtat-Kolegio San Francisco; d-ro Robert W. Blair, Universitato Brigham Young (Provo, Utah); d-ro Ralph Lewin, Scripps-Instituto de Oceanografio, kaj d-ro David Jordan, Antropologia Fakto, Universitato de California (La Jolla); d-ino Margaret Hagler, Kolegio Lincoln Land Community (Springfield, Illinois), kies doktoriĝa disertacio titoliĝas *Esperanto kiel literatura perilo*; ankaŭ doktoriĝaj kandidatoj, Duncan Charters, Universitato Indiana (Bloomington); John Gadway, Universitato Sud-Illinois (Carbondale); — sendube en ĉi tiu listo ni preterlasis multajn aliajn.

Kion atingis la usonaj esperantistoj?

Kion atingis en la lastaj kelkaj jaroj la usonaj esperantistoj? Dum jaroj oni aŭdis pri Esperanto en Nov-Jorko kaj Ĉikago, kaj Kalifornion oni nomis la Esperanto-provinco. Sed nun okazos Universala Kongreso en Portlando (Oregon). La unua demando de la esperantistoj estis: "Kie troviĝas Portlando?" — Pro tio la kongres-insigno kun usona landkarto. Kuraĝon ni havas — eble bravecon. Sed kion plian ni atingis? Ni menciuj nur kelkajn vigligantajn grupojn:

Florido (sudorienta ŝtato)

Nun ekzistas tut-provinca organizaĵo sub aktiva gvidado de s-ro Rex Bennett en urbo Tampa. Ili multe helpas d-ron Stanley Drake en la nova Universitato

TOROJ DE LA MOVADO EN USONO

C. Schulze

Ft. Lauderdale. S-ro Bennett instruas Esperanton en Universitato de Sud-Flrido.

Havajo

Kio pri Havajo — tiu plej nova el la 50 usonaj ŝtatoj — kiu situas inter Azio kaj Nord-Ameriko? Ĉiuj 200 elementaj lernejoj tie nun instruas modestan Esperanto-lecionaron al infanoj en la kvara lerneja jaro en ĝenerala kurso pri komunikado. Infanoj en Havajo minimume scias, kio estas Esperanto. Ĝis nun 95 procentoj de la usonanoj tion ne scias. En la Esperanto-Inform-Centro ni ricevas, inter aliaj strangaj petoj, petojn pri domservistinoj, kiuj parolas la hispanan lingvon; do, evidentiĝas, ke multaj personoj kredas, ke Esperanto estas nomo de iu hispana organizaĵo.

Illinois

En Ĉikago, s-ro Kent Jones estas la motoro, kiu inspiris multajn bonajn kunlaborantojn. Grava kunlaboro kun diversaj edukaj instancoj komenciĝis. La usona asocio de instruistoj de fremdlingvoj unuafoje akceptis informtablon pri Esperanto en la jara kongreso.

La urbestro de Ĉikago, Richard Daly, faris specialan deklaron por la Semajno de Internacia Amikeco en 1972. Kun la helpo de parlamentano Roman Pucinski, s-ro Jones ricevas favoran akcepton ĉe la edukaj instancoj en la urbo kaj en la ŝtato Illinois.

Massachusetts

En ĉi tiu orienta ŝtato la motoroj estas la UEA-delegito Allan Boschen, magistro pri eduko, kiu instruas al skoltoj inter aliaj; kaj Channing L. Bete, kies kompanio eldonis la popularan informilon *The ABC's of*

S-ino Gizella Giguere gvidas inteligentulan grupon el la 123 infanoj, kiuj lernas Esperanton. (En la ŝtato Flrido.)



Federacia parlamentano s-ro Roman Pucinski subskribas la proponon de UEA por Unuiĝintaj Nacioj. Dekstre: s-ro R. Kent Jones el Ĉikago.

Esperanto kaj eldonos la novan lernolibron de William Auld *A first course in Esperanto* (Unua kurso de Esperanto).

Ohio

Sub la gvido de Lewis Cook, stariĝis nova tut-ŝtata organizaĵo en multaj grandaj urboj: Cleveland, Cincinnati, Toledo, Columbus, kie s-ino Jane Willis organizis 150 radio-lecionojn por la eduka radio-stacio de Ohio-Ŝtat-Universitato. Du instruistoj, Jim Smith kaj Ronald Burris, instruas Esperanton al 70 mezlernejoj. Paul Lareau, bibliotekisto en Toledo, nun organizas bibliotekistojn kaj faras planojn por speciala kunveno dum la 57a UK en Portlando.

Texas

En Texas, kie dum jaroj nur la familio de la UEA-ĉefdelegito Armin Doneis kaj kelkaj izolitaj individuoj montris interesiĝon pri Esperanto, nun ekzistas viglaj grupoj en la grandaj urboj Houston kaj San Antonio.

Washington (nordokcidenta ŝtato)

Walla Walla — Sub la gvido de kapabla kaj inspira s-ro Albert Estling laboras viglaj membroj de tiea

Motoroj de la movado en Usono

(daŭrigo de p. 63)

klubo. Ili enkondukis Esperanton en lernejojn. S-ino Estling prizorgos la bankedon por la 57a UK en Portlando.

Olympia — S-ino Mary Hammersmith organizas kursojn kaj agadojn en Olympia. Ŝi kunlaboras lerte kun esperantistoj en la tuta Nordokcidento.

Spokane — Malgranda sed konstanta grupo tie kunlaboras kun la delegito H. K. Ver Ploeg. Li estras la kunlaborantaron por la 57a UK, kiu venos el ĉiu angulo de Usono por garantii unuarangan kongreson. S-ro Ver Ploeg ankaŭ prizorgas diligente la sonbend-servon por la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko.

Aberdeen — D-ro H. I. Weiner verve kaj vigle inspiras ĉiujn, kiujn li kontaktas. Okulisto, kiel Zamenhof mem, li senlace instruas, organizas, kontribuas librojn al bibliotekoj kaj per persista, inteligenta agado konvinkis la instancojn ĉe Kolegio Grey's Harbor Community enkonduki oficialan, plenrajtan kurson de Esperanto.


* * * *

Ankoraŭ restas ŝtatoj, kie movado apenaŭ ekzistas. En aliaj, kiel Alasko, Arizono, Nov-Meksiko, fidele laboras esperantistoj grupete. Ni penas ĉie havigi novajn UEA-delegitojn.

Ĉefaj aranĝoj en somero 1972 en Usono

Ses diversnivelaĵoj okazos en la Universitato de Portlando, de la 10a ĝis la 28a de julio, pri metodoj konversacia, literatura, lingvistika ktp. Profesoroj estos: d-ro Edmund Brent el Toronto (Kanado); d-ro Richard Wood el Baton Rouge, Lousiana; Duncan Charters el Bloomington, Indiana — ĉiuj spertaj esperantistoj kaj lingvistoj.

La televida stacio TV-2 komencis elsendi Esperanto-kurson en Pittsfield (60 000 loĝantoj) kaj Dalton (5 000 loĝantoj), ambaŭ en la ŝtato Massachusetts. La kurso daŭras 13 semajnojn, po 2 duonhoraj prezentoj por semajno. Kun la instruisto s-ro Allan C. Boschen (maldekstre) kunlaboras i.a. gestudentoj kaj skoltoj.



Kvankam la radio-kurso en Columbus (Ohio) silentas pro la sanstato de s-ino Jane Wills, kvar aliaj radiostacioj en la ŝtatoj Ohio kaj Oregono disaŭdigas la kurson per ludo de la lecionoj faritaj de ŝi.

Necesas via kuraĝigo

Modestajn sukcesojn lastatempe atingis manpleno da fidelaj usonaj esperantistoj. Nun ni urĝe petas, ke ĉiu esperantisto, kiu povas — VENU al Portlando, por ke ni faru imponan manifestacion antaŭ la instancoj, kiuj sindone apogas nin. Certe en Portlando vi trovos multajn freŝbakitajn esperantistojn. Ili bezonas vian kuraĝigon. Ili estas pretaj lerni de vi. De ili vi ricevos elkoran bonvenigon, kaj vi profitos de ilia freŝeco kaj entuziasmo. La 57a UK ne multe similos al aliaj Universalaj Kongresoj. Ĝi estos unike usona. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al vi.

Postkongreso en Sanfrancisko

Ĉi-jare ankaŭ la postkongreso ne multe similos al pasintaj postkongresoj. En nature bela urbo vi intime vivos, lernos kaj amuziĝos kun amikaj esperantistoj el la tuta mondo. El ĉiuj 50 usonaj ŝtatoj venos esperantistoj por bonvenigi vin kaj por ekkoni Esperantan kulturon.

Ĉi-matene venos reprezentantoj el niaj diversaj etnaj grupoj por rakonti al vi pri siaj historio kaj kontribuo al la usona socio. Posttagmeze ni ekskursos kune. Vespere ni ĝuos bankedojn, distraĵojn, kaj vizitojn al la hejmoj de esperantistoj. Vi ĉiuj estos gastoj de la urbo kaj de Ŝtat-kolegio Sanfrancisko. Venu amase.

Espereble ankaŭ vi reagos kiel jugoslava esperantisto Zoran Tušanov, kiu, post monata vojaĝo en Usono, kie li vizitis ankaŭ lernejojn kaj hejmojn de esperantistoj, skribis al ni en la Esperanto-Inform-Centro jene:

"Mi devas diri al vi, ke mi forlasis Usonon kun la plej bonaj impresoj kaj ke mi estas tre kontenta pri la vojaĝo. Ĝi vere pliriĉigis min, ĉar mi vidis mondon tre malsaman ol tiu, kiun mi vidis ĝis nun. Mi renkontis ankaŭ multajn interesajn kaj tre ĉarmajn homojn. Mi devas diri al vi, ke miaj imago kaj ideoj pri Usono multe ŝanĝiĝis. Kio pleje impresis min en via lando, ne estas la tekniko, nek la materia riĉeco, sed la homoj. Ili estas tiel ĉarmaj, simplaj, malfermitaj kaj modestaj, ke estis al mi vere granda plezuro konatiĝi kun ili."


Se la kongresanoj simile sentos, ni estos tute re-kompencitaj pro niaj laboroj por via plezuro.

SUKCESA EN PLEZURIGO DE LEGADO

Recenzas Stephan Zamenhof (Usono):

La serĉado de la vivo, de Egami Fujio. Tradukis Matuba Kikunobu. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1971. 167 p. Ilus. 19 cm.

La kompreno de la vivo estas la fina celo de biologoj. La vojo estas malfacila, kaj la montopinto ankoraŭ malproksima. Tamen, en tiu ĉi jarcento oni atingis ioman sukceson, post la agnosko, ke la vivo nepre estas, esence, ĥemia sistemo, kaj ke pro tio ĝi estas studebla per ĥemiaj (tiel nomataj bioĥemiaj) metodoj. Neniu havas pli bonajn kvalifikaĵojn por klarigi tiun pristudadon al esperantistoj ol la eminenta bioĥemiisto, samtempe eminenta esperantisto, d-ro F. Egami. En sia admirinda libro, *La serĉado de la vivo*, li sukcesis ĉe la malfacilega tasko klarigi komplikan bioĥemian kaj biologian pensadon je la kompren-nivelo de nesciencistoj, ĉio ĉi en libro de facile leg-



Prof-o Egami, la prezidanto de la Japana Akademio kaj la aŭtoro de "La serĉado de la vivo", diras: "Sen forgesi la facile videblajn celojn, ne estas eble trafi pli grandajn celojn kuŝantajn malantaŭ ili. Estas ĝojo de la sciencisto esploradi, ne sciante, kia rezulto venos."

ebla amplekseco. Plue, li sukcesis sendolorigi kaj plezurigi tiun legadon.

D-ro Egami komencas sian libron per mallonga sed efika historio de bioĥemio, por enkonduki la leganton en la pli komplikan esploron, kiu sekvas. Poste li konsideras la difinon de la vivo. D-ro Egami estas modestulo: li bone konas la tiucelajn malfacilaĵojn. Tial, anstataŭ sensignifajn vortojn uzi, li prezentas al la leganto iun "senton" pri la bioĥemiaj faktoj de la vivo, pri la fundamentaj ecoj de vivaĵoj kaj pri la konceptoj de "normaleco" kaj de "identeco".

Por plifaciligi la sekvajn ĉapitrojn, d-ro Egami tiam rivelas la principojn de digestado kaj la koncepton de "transinformado", kiu — kiel poste klarigote — troviĝas precize je la bazo de nia kompreno pri la

transdono de vivo al posteuloj. Por tiuj ne spertaj je ĥemio, li klarigas la elementojn, la organikajn ĥemion, la amino-acidojn kaj la proteinojn.

Ĝuste tiam li alvenas ĉe la nukleaj acidoj; kaj tiam li paŭzas respektive, ĉar li atingis la "centran sanktejon" kaj deziras instigi en la leganto senton de graveco. Ĉi tie estas bone klarigata la bioĥemio de nukleaj acidoj, kaj la leganto estas preparata por la venontaj ĉapitroj.

Poste la leganto renkontas la signifojn kaj de biokatalizo* kaj de enzimoj**, kune kun la problemoj de la interŝanĝoj de enĉela energio, ĉiuj necesaj por la kompreno de la sekvantaj partoj. La tujposta ĉapitro estas la kerna, ĉar ĝi temas pri la meĥanismo de "genetika informado": jen kio revoluciigis la biologian scion de la 20a jarcento. Nun la leganto komprenos la sintezon de proteinoj, de enzimoj, de virusoj.

Je ĉiu el tiu ĉi procezoj necesas akurata reguligado por sukceso. La meĥanismoj de tia reguligado estas mallonge klarigataj en la sekvanta ĉapitro. Fakte, ni konas nur etan parton de ĉio scienda pri tiu reguligado; laŭ la konjekto de la recenzanto, jen la ĉapitro, kiun, por ĉiu nova reeldono, d-ro Egami devos refoje reverki pro faktoj ankoraŭ nesciataj.

Eĉ se la aŭtoro estus haltinta tie ĉi, ja estus sufiĉe valora la libro. Sed la ambicio de d-ro Egami estis, konduki la leganton precize al la nuna limo de la scienco, ĉe la ekesto de la vivo, la eblecoj de ekstera vivo, la provoj sintezi "vivantajn" (t.e. mem-rekreantajn) nukleajn acidojn. Pri tiuj temas la finaj ĉapitroj.

Resume: la malfacila tasko, enkonduki la laikon en la centran koron de ĉiu temero, estas admirinde plenumita.

Mendu ĉe UEA: 12,— gld. (por Nederlando 12,48 gld.) + sendokostoj 10%.

* katalizi = influi la rapidecon de kemia reakcio (red.)

** enzimo = solvebla fermento (red.)

GAJNU MONON POR UEA — KAJ POR VI MEM!

La enspezoj de UEA el pagitaj anoncoj atingis novan rekordon en 1971: ĉirkaŭ 15 000 guldenoj! Por anoncoj en la revuo *Esperanto* estis pagitaj 7 700 gld. kaj por anoncoj en la du partoj de la Jarlibro: 7 300 gld.

La kresko de la nombro de anoncoj en *Esperanto* (ili ampleksas preskaŭ 5 paĝojn en ĉi tiu numero) devigis nin altigi la prezojn. La nova tarifo aperas sur la dua kovrila paĝo. (La tarifo por la Jarlibro ne ŝanĝiĝis.) Se vi varbos anoncon por la revuo aŭ por la Jarlibro de komerca, turisma aŭ simila instanco, vi ricevos kiel makleraĵon 10% de ĝia prezo. Provu!

La Centra Oficejo volonte disponigos al vi informilon pri anonc-tarifoj kaj specimenajn ekzemplerojn.

FIDINDA GVIDILO POR NEDERLAND- LINGVANOJ



La aŭtorino A. J. Middelkoop ➡



Recenzas Paul Peeraerts (Belgujo):

Nederlands-Esperanto-Nederlands, A.J. Middelkoop. Utrecht/Antwerpen: Het Spectrum N.V., 1971. 488p. 18cm.

Jam delonge la nederlandlingvanoj devis kontentiĝi per malmmodernaj kaj tute ne kompletaj vortaroj. La nova vortaro de "Het Spectrum", eldonejo i.a. de pluraj aliaj vortaroj, finfine povos anstataŭi ilin kaj certe estos fidinda gvidilo.

La aŭtorino en la enkonduko skribis, ke ŝia penado al kompleto estis haltigata de la maksimuma amplekseco de la vortaro. Malgraŭ tio ĉi, dum dumonata uzado, la libro neniam donis kialon por seniluziiĝi. Krom la kompleto, granda avantaĝo de tiu ĉi vortaro estas la ofte bonegaj tradukoj de diversaj

nederlandaj esprimoj kaj proverboj, antaŭe tre malfacile troveblaj.

Ĉu tamen nenio malbona direbla pri tiu ĉi verko? Nur pri malmulto oni povus eventuale plendi. Preseraroj estas kelkaj, precipe forfaloj de la supersignoj de la ĉ, ĝ, ŝ ktp. La kvin milionoj da nederlandlingvanoj en Belgujo povus plendi pri la fakto, ke ili tute estas neglektitaj. Ekzemple en la listo de mallongigoj troviĝas KEG, KUNE, LEEN kaj FEN, sed BEF ne estas trovebla. La vorto "doctorandus", kiu en la du landoj havas malsaman signifon, aperas nur kun traduko de la nordnederlanda senco.

Sed malgraŭ tio ni povas nomi la vortaron valora verko, certe nepre por ĉiu nederlandlingvano.

Mendu ĉe UEA: 5,29 gld. (por Nederlando 5,50 gld.) + sendokostoj 10%.

RAFINITA SUGESTIVO

Recenzas Paul Lobut (Parizo):

Invit' al japanesko, de Miyamoto M. La Laguna: J. Régulo, 1971. Stafeto: serio Beletraj Kajeroj n-ro 42. 110p. 19cm.

La aŭtoro, plurfoje laŭreato ĉe la Beletraj Konkursoj de UEA, jam verkiste diskoniĝis. Nun William Auld, Ueyama masao kaj Juan Régulo prilume enkadrigas lian poemaron. Certe, jen majstroverko bonvena por ĉiuj, kiuj jam aprecas la japanan poezion; la aŭtoro invitas pli vastan legantaron.

En liaj poemoj mankas nek fantazio, nek humuro, nek esprimnuancoj; vin ravis avangarda adverbuzo. La japana poezio distingas sin per rafinita sugestivo kaj kvazaŭ seneco de *redundanco**; la japano „hajkas“, kiel li spiras, ĉe ĉiu vivokazo. Lasu vin tenti per stilo solida kaj eleganta, lasu vin kapti de kelkloke magieska povo.

Rimarkendas, ke japano uzas specife germandevenan vorton „gemuta“**, pruve ke la Esperanto-kulturo ne estu niveligo al komunaj mezaĵoj, sed pliriĉigo per adopto de fremdaj valoroj.

Mendu ĉe UEA: 7,80 gld. (en Nederlando 7,10 gld.) + sendokostoj 10%.

*redundanco = abundo kaj ornamo en mesaĝo, longigo de komunikado sen plia informo.

**"gemütlich" = hejmece aŭ intime komforta kaj agrabla (red.).

KOMPLETA KOLEKTO DE OFICIALAJ VORTOJ

Recenzas Kawasaki N. (Oosaka):

Leksikono de oficialaj vortoj / The accepted Esperanto dictionary. Kompilis Edward Ockey. Banstead (Britujo): la kompilinto, 1971. 20 p. 21 cm.

Jen la plej kompleta kolekto de la oficialaj vortoj. Nur forestas la Akademiaj decidoj en 1971.

La Leksikono, inter la kapvortoj, registras *amis UV**, *aminta UV*, *amita UV*, *pezilo UV*, *resumi UV*, sed ne *faris UV*, *farinta UV*, *farita UV*, *saniga*, *malsano*... (Ekzercaro 42). En la Leksikono mankas la aŭtoraj difinoj, kio estas la oficialaj radikoj kaj la oficialaj vortoj.

En "Plena ilustrita vortaro" *mis*-4, *-end*7, en la Leksikono *mis*- 1929, *-enda* 1952. La Akademio neniam difinis, ke *end* portu ciferon 7 (Seps Aldono, 1958).

La verko de Ockey estas nepre suplemento al tiaj vortaroj, kiaj estas Esp.-Angla de Wells aŭ Esp.-Japana de Mijake, kie la oficialeco de la radikoj ne estas montrita.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. (por Nederlando 1,87 gld.) + sendokostoj 10%.

* UV = "Universala vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto" (1893), parto de la "Fundamento de Esperanto" (1905).

Por pli efika informado (8)

INTERPRETADO

IVO LAPENNA


En la lasta artikolo estas koncize pritraktita la graveco de senerara nacia lingvo, ĉu en originalaj tekstoj, ĉu en tradukoj. Interpretado postulas apartan konsideron.

Interpretado estas bezonata ĉefe en jenaj kazoj: prelegoj de eksterlandanoj; intervjuoj kun eksterlandanoj aŭ gazetaraj konferencoj kun partopreno de eksterlandanoj; publikaj debatoj, identaj aŭ similaj al la Forumo en la kadro de la Universala Kongreso en Londono. Kutime temas pri interpretado el la Internacia Lingvo en la koncernan nacian, sed ankaŭ inverse. Kelkfoje, precipe dum intervjuoj kaj gazetaraj konferencoj, okazas ambaŭdirekta interpretado.

Rolo grava kaj delikata

Ĉiam la afero estas relative grava: oni invitas iun kompetentan eksterlandanon fari prelegon, aŭ ĉeesti gazetaran konferencon aŭ partopreni debaton. Tial, kiel ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, la rolo de la interpretanto estas aparte grava kaj delikata. Li devas ne nur scii bonege ambaŭ lingvojn, sed ankaŭ havi kaj talenton por interpretado kaj spertojn en tiu malfacila laboro. Krome, se la interpretado rilatas al iu faka temo, li devas esti aŭ samfakulo aŭ almenaŭ bona konanto de la koncerna sfero. Necesas konsideri ĉiujn menciitajn elementojn antaŭ ol akcepti la respondecan taskon funkcii kiel interpretanto. De liaj talento kaj lerteco dependas ĉio: preleganto aŭ la intervjuanto estas komplete en liaj manoj, precipe se li tute ne konas la lingvon, en kiu oni interpretas. Al tio aldoniĝas la fakto, ke bona, vigla, adekvata interpretado, farata en senriproĉa nacia lingvo, per si mem estas potenca pledo por la lingva kaj ĝenerale kultura valoro de Esperanto. Aliflanke, mallerta interpretado, kun multaj haltoj kaj miskomprenoj, kun abundo da ĉiaspecaj eraroj en la nacia lingvo, havas precize la kontraŭan efikon: kutime oni ne kulpigas la interpretanton, sed oni diras, ke, jen la Internacia Lingvo ne estas sufiĉe taŭga, aŭ eĉ, ke ĝi estas komplete malperfekta. Kompreneble, tiajn riproĉojn oni neniam aŭdos pro fuŝinterpretadoj — tre multnombraj, cetere — de unu nacia lingvo al alia, sed certe jes, se la fuŝaĵoj okazas dum interpretado el Esperanto en iun nacian lingvon, aŭ inverse.

Kiel konate, eĉ profesiaj interpretistoj renkontas multajn malfacilaĵojn kaj ofte faras erarojn. Ni ne havas profesiajn interpretistojn, sed ni tamen havas tre kompetentajn kaj sindonajn interpretantojn. Ne



multajn, sed preskaŭ en ĉiu lando troviĝas almenaŭ kelkaj. Aliflanke, ofte okazas, ke personoj bonintencaj, sed sen la necesaj minimumaj scioj kaj spertoj, transprenas iom senrespondece tiun taskon kaj, anstataŭ helpi, fakte kaŭzas grandan malbonon.

Por eviti negativajn, aŭ kelkfoje eĉ katastrofajn sekvojn, la organizantoj de diversaj aranĝoj, kiuj postulas interpretadon, nepre devus transdoni tiun delikatan taskon al efektive kompetentaj personoj. Precipe tio estas grava por libera interpretado, sen antaŭpreparoj. Se ne troviĝas tiaj personoj, tiam necesas havigi al la interpretonto la tekstojn almenaŭ kelkajn tagojn antaŭ la aranĝo. En kazo de prelegoj la interpretonto devus ricevi la tekston sufiĉe frue, traduki ĝin komplete, relegi plurfoje por familiariĝi kun la temo, dum la preleganto devus sekvi kiel eble plej multe la anticipe skribitan tekston.

Nur serioza rilato al interpretado garantias sukceson. Se oni ne agas tiel, la malsukceso estas neevitebla. Kaj ĝi samtempe signifas ne kontribuon al plua disvastigo de la Internacia Lingvo, sed fortan kontraŭpuŝon.

FORPASIĜIS C. C. GOLDSMITH, iama direktoro de la Centra Oficejo

Unu el la plej rimarkindaj personecoj de la Esperanto-movado ne plu estas inter ni.

C. C. Goldsmith, sindona kaj ĉiuflanka aganto por la Internacia Lingvo, preciza kaj akurata, fulmrapida en sia laboro, restos en daŭra rememoro pro siaj grandaj meritoj por Esperanto sur diversaj kampoj, sed ĉefe pro sia multjara servado al UEA kiel ĉefo de ĝia Centra Oficejo.

Diference de multaj, kiuj post meteora ekbrilo en la historio de Esperanto tuj estingiĝis, C. C. Goldsmith daŭre, ekde 1907 ĝis sia malapero, aktivis en plej diversaj funkcioj aŭ ekster kia ajn oficiala pozicio. Se pri iu oni povas diri, ke li restis fidela al idealoj de la junaĝo ĝis sia lasta spiro, tiam certe pri la "etulo", kiel oni karese lin nomis: li forpasis tuj post prelego pri la Internacia Lingvo dum respondado al demandoj.

UEA kaj la tuta esperantistaro respektoplene kliniĝas antaŭ la elstara figuro de C. C. Goldsmith, kiu servu al ĉiuj kiel imitinda ekzemplo de konvinko, fido kaj persisto.

S-ino Lily Jullie Goldsmith kaj la tuta familio akceptu la plej profundajn kaj sincerajn kondolencojn de la membraro, Komitato kaj Estraro de Universala Esperanto-Asocio.

Ivo Lapenna

La subita morto de Cecil Charles Goldsmith, ofte ame nomita "Tiny" (eta) Goldsmith, la 2an de marto 1972 je la aĝo de 82 jaroj ne ŝajnas kredebla, ĉar li aspektis, kvazaŭ li trovis la sekreton de eterna juneco.


Esperanto multon ŝuldas al li. Ĝis la lasta sekundo de sia vivo li laboris por la lingvo. Li faris stimulan paroladon pri Esperanto apud Sydney, Aŭstralio, kaj, dum li respondis al demandoj, subite kolapsis morta.

Li lernis la lingvon en 1907. Li servis kiel oficiro en la Brita Armeo kaj severe vundiĝis. En 1917 oni prognosis, ke nur unu-du horoj restas al li. Li malrapide resaniĝis kaj en 1923-24 iris por loĝi, dumtempe, al Germanujo, kie la esperantistoj helpis al lia resaniĝo. Li partoprenis la kongreson en Nürnberg.

Tamen, jam en 1920 li estis sekretario de la nacia kongreso en Britujo kaj poste multfoje plenumis tiun oficon. Li longe oficis en la oficejo de Brita Esperantista Asocio kaj fariĝis ĝia sekretario. Lia laboro en Britujo estis multflanka kaj inkluzivis la fondon de "Esperanto Publishing Company".

Sed de 1936, kiam li fariĝis la direktoro de UEA, lia ĉefa rolo estis internacia.

Li estis unu el la instigintoj kaj subskribintoj de la Interkonsento de Kolonjo, kaj, kiam necesis fondi Internacian Esperanto-Ligon, estis li, kiu fariĝis la ĝenerala sekretario (la tiama titolo de la direktoro). Li sukcesis organizi la Ligon dum la frua periodo, kiam ĝi havis eĉ ne unu moneron en la kaso. Li trans-



C. C.
Gold-
smith

donis al IEL la domon en Heronsgate, kiu estis persona donaco al li uzota por Esperanto. Post jaroj da dumtempaj improvizaĵoj la akurata apero de la granda jarlibro en 1938 estis triumfo por li.

Dum la dua mondmilito li vivtenis la internacian centron de la movado preta, por ke ĝi povu normale ekfunkcii post la milito, kaj eĉ reprenis la sekretarian laboron de Brita Esperantista Asocio, kiam la sekretario devis militservi.

Kiam en 1947 okazis la fandiĝo de IEL kun la malnova UEA, li fariĝis la ĝenerala sekretario (tiama titolo de la direktoro) kaj la Centro restis en Britujo.

Li estis sekretario de la Universalaj Kongresoj en Oxford 1930, Londono 1938 kaj Bournemouth 1949. Sed oni plej bone memoros lin sidanta je la flanko de la prezidanto dum la malfermaj kunsidoj de multaj Universalaj Kongresoj — nur parteto de lia kongresa laborego.

En 1954, kiam li fariĝis 65-jara kaj rajtis al ŝtata pensio, li ekŝiĝis el sia ofico en UEA. Li plu faris taskojn por Esperanto, sed, kiam lia edzino Clara mortis, li decidis vojaĝi al Aŭstralio por survoje saluti siajn multajn geamikojn. Li sentis sin tiel feliĉa, ke li decidis fari sian hejmon tie. Li organizis nacian kongreson kaj fariĝis la ĝenerala sekretario de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj aktivis tie kun entuziasmo kiel freŝe varbita junulo. Li reedziĝis en Aŭstralio en 1971 al esperantistino Lily Jullie.

Al ĉi tiu skeleta historio oni devas aldoni milojn da leteroj kaj renkontiĝoj, centojn da komitatkunsidoj kaj publikaj paroladoj, organizon de kursoj, karavanoj k.c., k.c. Ĉio ĉi estas vivo plenplene dediĉita al Esperanto.


H. W. Holmes

JOSÉ SERRANO LÓPEZ (1906 - 1971)

La prezidanto de Meksika Esperanto-Federacio, s-ro José Serrano López, mortis en la 9a de novembro ne longe, post kiam li inaŭguris sian domon kiel "Esperantan Angulon" dediĉe al esperantista uzo. Historio de Esperanto en Meksiko, verkita de li, restas ne publikigita.

W. H. KING

En la 25a de januaro 1972 mortis en Whangarei, Nov-Zelando, William H. King, dumviva membro de UEA kaj ekssekretario de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Lia verko "Historio de Esperanto en Nov-Zelando" estas eldonota.



28-A I.J.K. EN POLLANDO

Temo: Junularo kaj la Tria Mondo

TEJO-redaktoro:
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo

Pollando invitas vin! Venu! De la 14a ĝis la 16a de julio 1972 al la antaŭ-kongreso en Varsovio, de la 16a ĝis la 22a de julio 1972 al Töruń, kie okazos la Internacia Junulara Kongreso (IJK) mem, kaj nelaste al Gdańsk, kie de la 22a ĝis la 25a de julio 1972 okazos la post-kongreso; ankaŭ komencantoj ne timu veni: laŭ instigo de la Lerneja Komisiono de TEJO estos ebleco partopreni dumkongresajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Aliĝeblecoj pli-diversiĝis intertempe: Al la baza kotizo por IJK 34 dolaroj aldoniĝas 15 dolaroj por Varsovio aŭ 17 dolaroj por Gdańsk. Por ĉiuj tri aranĝoj kune 60 dolaroj. Kongresanoj el transpagipovaj landoj aliĝu kaj pagu al: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam-11, je "Stichting voor Internationale Communicatie", pĉk NL-1975735; escepte de civitanoj de F.R. Germanujo, kiuj aliĝu kaj pagu en nacia valuto al G.D. Winkler, adreso supre (bonvolu peti specialan informilon); *aliĝoj* eblas nur ĝis plej malfrue la 31a de majo.

Por la unua fojo aldoniĝas ebleco partopreni preparan seminarion prokongresan: de la 16a ĝis la 18a de junio 1972, en Hattingen, F.R. Germanujo, kie ĉefe temos pri "vivo en Pollando — hieraŭ kaj hodiaŭ", lumbildprelego pri Pollando kaj praktikaj informoj kaj preparoj; aldoniĝos aro da amuzaĵoj kiel i.a. gaja balo, kampofajro kaj kastelgasteja trinkado; por kongresanoj — laŭ interkonsento — ankoraŭ eblas *senpaga* partopreno; interesitoj aliĝu ĉe G. D. Winkler.

Nederlanda skoltestro, s-ro B. J. Wijmer, okaze de la monda ĵamboreo en 1971 traveturis Japanujon helpe de esperantistoj, kiuj konvinkis lin fariĝi esperantisto.



BRAZILO FARTAS BONE

Ekde sia fondiĝo en 1967 Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) senlace aktivis, celante kunigi la junajn esperantistojn en tiu grandega lando; regule eldoniĝas la oficiala organo "Impulso" (dumonata) kaj nacilingva informbulteno sendata al gazetoj, radio- kaj televid-stacioj; BEJO eldonis ankaŭ didaktikaĵojn, el kiuj elstaras "Você sabe Esperanto?" de C. Melo, aganta sekretario de BEJO; i.a. januare li gvidis kurson en Maceió, kiun partoprenis ĉirkaŭ 700 gelernantoj. Sekvintan monaton 100 personoj ricevis diplomon pro simila kurso en Caruaru.

Atenton ankaŭ meritas la universitata agado. Elstaras la "liberaj kursoj" de Fortaleza, konataj pro alta instrua kvalito. En multaj universitataj fakultatoj aliloke BEJO-anoj faras ekspoziciojn kaj okazigas liberajn kursojn. Nelaste menciindas la oficiala enkonduko de Esperanto kiel elektebla studobjekto en oficiala universitata kurso en Belem.

La individua membraro kreskis de 110 en 1970 al 160 en 1971. Pluraj lokaj sekcioj estis fonditaj, kaj en multaj urboj nomiĝis delegitoj, "semoj" por estontaj sekcioj. Ankoraŭ menciindus precipe la Rioa grupo, kiu konatiĝis pro sia amuzplena laborstilo. En Salvador lanĉiĝis interstudenta enketo kaj intervjuakampanjo. Rezulte disaŭdiĝis novaĵoj pere de televido (entute pli ol 12 minutoj), per radio (pli ol 30 minutoj) kaj publikiĝis pli ol dudek artikoloj en la gazetaro.

Prezidanto de BEJO estas José Maria Marques, kiu krome vige kunlaboras en la Lerneja kaj Sudamerika Komisionoj de TEJO, kiun lastan li gvidas. Pliajn informojn ĉiam pretas doni: s-ro Henrique Knoedt, C.P. 945, 40 000 Salvador, Ba., Brazilo.

IOM PRI LA VIVO DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Enkadre de la seminario en Hamburgo okazis ankaŭ la jarĉefkunveno de GEJ; jen kelkaj rimarkindaj rezultoj el la agadresumo pri la pasinta jaro: La membronombro daŭre kaj konsiderinde kreskis, kaj, kio estas pli grava: tio ĉefe ŝuldiĝis al restarigo kaj plifortigo de kelkaj regionaj grupoj fare de lokaj aktivuloj ekster la federacia estraro; plej menciindas i.a. Hamburga, Lohn'a, Münster'a, Ruhr'aj, Vinstrata kaj Zweibrücken'a esperantistaj junularaj rondoj; en F. R. Germanujo oni bone komprenis, ke nur bonfunkciaj regionaj kaj lokaj grupoj vere certigas la daŭran kaj prosperan vivon de iu ajn centra asocio, ĉar nur la kontakto kaj kunlaboro enkadre de forta komunumo evitas perdiĝon kaj malaperon de unuopaj membroj, — kaj la vere okulfrapa sukceso pravas, ke estis bona vojo!

Do ni resume gratulu al GEJ-anoj pro la trovita nova vojo al plifortikiĝo kaj sukceso, kaj esperu, ke ili daŭrigos sian laŭdindan laboron same vige ankaŭ en sekvontaj jaroj kaj ke imitu la bonan ekzemplon aliaj malfortaj landaj sekcioj de TEJO, kiuj ankoraŭ serĉas vojojn kaj rimedojn por sukcesigi sian agadon. Al demandoj pri germana junulara agado pretas respondi la redaktoro de TEJO-paĝo mem.

sano en menso

Kreskas nova generacio de pensuloj.

Morgaŭajn malkovrojn faros la junuloj de hodiaŭ.

Daŭre kreskas ankaŭ la scienco de l'homaro, kaj ĉiu infano devas lerni pli ol liaj gepatroj.

Instruiloj de Philips igas lernadon pli facila, pli plezura.

Moderna klasĉambro ne estas kompleta sen magnetofono, instru-maŝinoj, televido aŭ radio.


Sed, kiel ĉio kio kreskas, ankaŭ infano bezonas protekton, protekton kontraŭ malsaniĝo.

Radiografiaj kaj medicinaj aparatoj de Philips helpas gardi la sanon de la nova generacio.

Philips fieras pri sia kontribuo al la mondo de morgaŭ.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips

kaj korpo



PHILIPS



S-ro Atanas D. Atanasov, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, resalutas al amaso da gratulantoj. (Vidu ĉe "Persone".)

LOKE — FAKE — PE

PERSONE

Atanasov

- S-ro Atanas D. Atanasov, kies 80-jariĝo estis raportita en la marta numero (p. 51), ricevis en februaro ŝtatan ordenon "Kiril kaj Metodij" de Bulgario pro sia multjara laboro je popularigo de bulgara literaturo kaj kulturo en eksterlando kaj pro la meritoj por evoluigo de la bulgara kaj internacia Esperanto-movadoj.

LOKE

Aŭstrujo

- Aŭstra televido en la 25a de januaro 1972 elsendis programon pri Vieno, kiu enhavis interalie prezenton de la Internacia Esperanto-Muzeo fare de konata aktoro Hans Holt kaj Esperantan kanton de Charlotte Hube.
- Radio Wien anoncis la Semajnon de Internacia Amikeco krom en la Esperanta elsendo ankaŭ en la germana lingvo inter la ĝeneralaj diversaj informoj (1972-02-23).

Libroj kaj la transpaga problemo

Skribas Antoni Madej (Pollando):

En la januara numero mi legis eldirojn pri nia literaturo de tri konataj personoj: J. Régulo, E. Lapenna kaj Miyamoto M.

La literaturo suferas pro multaj obstakloj: malgrandaj eldonkvantoj, grandaj elspezoj, malmulta aĉetpovo, nekontentiga lingvoscio de parto de la esperantistaro ktp. Sed ne estas profitata tiu granda kaj avida Esperanto-merkato, kiun formas netranspagipovaj landoj.

Necesas trovi rimedon, per kiu esperantistoj en tiuj landoj povu aĉetadi librojn el ĉiuj aliaj landoj. Ĉu la fakdelegitoj de UEA pri bankaj aferoj aŭ iuj fakuloj ne povus solvi tiun problemon?

Se ĝi solviĝos, oni povos eldoni librojn en pli grandaj kvantoj, do malpli koste, kaj altiĝos la aĉetpovo. Sekve ankaŭ la aŭtoroj profitos.

Respondas la redakcio:

UEA tre konscias pri la problemo de la "netranspagipova" merkato kaj entreprenis plurajn paŝojn por malfermi ĝin. Al Pollando, ekzemple, ĝi vendis en 1971 Esperanto-librojn en valoro de ĉirkaŭ 6 000 gld., t.e. pli ol 7% de la tuta vendosumo por tiu jaro. Niaj membroj en tiuj landoj povas multe helpi, insti-

gante sialandajn libroeldonejojn produkti pli multajn kaj pli facile disvendeblajn librojn kaj diskojn en Esperanto. Tio forte stimulos ambaŭdirektan komeron.

Ni bonvenigos konsilojn ankaŭ de la fakdelegitoj, kompreneble.

Pli dikan kovrilon

Skribas Angel M. Corral (Argentino):

La materialo, ĉu literatura aŭ informa, kune kun la moderna prezentado de la revuo *Esperanto* estas tre bona, sed la kovrilo, ĉu ne estas eble presi ĝin sur pli bona papero?

Respondas la redakcio:

Ni volonte uzus pli fortikan paperon por la kovrilaj paĝoj de la revuo, se temus nur pri la ekstraj paperkostoj (kaj preskostoj, ĉar tiam ĝi ne estus samtempe presebla kune kun 12 aliaj paĝoj, kiel nun). Sed bedaŭrinde ni frontas la pezo-limon de la afranko. Nuntempe ĉiu ekzemplero de la revuo estas afrankata po 0,30 gld. Nur iomete fortikigi la kovrilon kaŭzus transpaŝon de pezo-limo, kaj la afranko saltus al 0,50 gld., t.e. diferenco de 15 000 gld. jare!

- Lige kun la Semajno de Internacia Amikeco okazigis kunvenojn i.a. Aŭstra-Aŭstralia Societo kaj Aŭstra-Bulgara Societo, al kiuj kontribuis vienaj esperantistoj.

Hungarujo

- La Fremdultrafika Informa Servo lastatempe anoncis la pretecon servi al informpetantoj, precipe okaze de Hungara Kultur-Festivalo. Oni povas peti ankaŭ regulan alsendadon de informfolioj de la Servo (adreso: Poŝtokesto 26, Budapeŝto VII).

Kubo

- La radiostacio "Radio Reloj" en Habana elsendis programon pri Esperanto kaj Zamenhof, en la 6a de februaro 1972. Ankaŭ la oficiala organo de la armeo "Verde Olivo" publikigis artikolon pri la Internacia Lingvo. Krome pli kaj pli kreskas la aktivecoj de unuopaj esperantistoj en loka nivelo.

Nederlando

- En la jaro 1971 aperis en nederlandaj gazetoj 280 artikoloj kaj komunikoj pri Esperanto (en la jaro 1970: entute 81), laŭ la statistiko de la nederlanda Esperanto-asocio La Estonto Estas Nia (LEEN). Laŭ la lastatempa statistiko de la institucio Teleac, kiu lanĉis kaj prizorgas la televidan kurson nun okazantan, aperis pli ol 200 informaj gazetartikoloj pri la televida kurso. Evidente tiu kurso vekis grandan interesiĝon pri Esperanto ĉe la gazetaro.

Soveta Unio

- La ĵurnalo "Pravda" lastatempe publikigis informon de Tass-agentejo pri la esperantlingva *Poŝatlaso*, eldonita en Ĉeĥoslovakujo.

Ekspozicio en Ljubljana, Jugoslavio. (Vidu ĉe "Fake – Ekspozicio".)



Usono

- En populara programo "Paŝu gigante" de la televida stacio NBC (kanalo 4) oni diskutis pri Esperanto, en la 11a de marto 1972. La programon prezentis junuloj. Ilin intervjuis Esperanto-Inform-Centro de la usona landa Esperanto-organizaĵo, kiu samtempe provizis dokumentojn por tiu programo.
- Krom Ĉikago (vidu la paĝon 51 de la marta n-ro), oficiale proklamis sian partoprenon al la kampanjo Semajno de Internacia Amikeco ankaŭ la urboj Sanfrancisko (Kalifornio) kaj Tampa kaj St. Petersburg (ambaŭ en la ŝtato Florido).

FAKE

Biblioteko

- Oni komencis organizi Internacian Esperanto-Asocion de Bibliotekistoj (IEAB). Ĝiaj celoj estas interalie: stimulado de internacia kunlaboro inter bibliotekoj, akcelado de la uzo de Esperanto, konstruado de Esperantaj kolektoj. Interesiĝantoj kontaktu kun la provizora sekretario s-ro Paul J. Lareau (1032 Orchard St., Toledo, Oh. 43609, Usono).

Ekspozicio

- De la 1a ĝis la 10a de oktobro 1971 okazis en Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenujo, Jugoslavio, ekspozicio de ĉirkaŭ mil Esperantaj libroj kaj centoj da gazetoj prunte disponigitaj el la kolekto de la Universala Ekspozicio, siatempe starigita de CED kaj nun konservata kaj aktualigata en la Centra Oficejo. Per tiu ekspozicio la Esperanto-Societo de Ljubljana festis sian 50-jaran jubileon.

Teatro

- Torĉon de la ĉeĥa kulturo en la Internacia Lingvo transprenis nun la nordbohemia urbo Liberec (75000 loĝantoj). La tiea Studio Ipsilono ĉe la Naiva Teatro surscenigis en la 18a de februaro 1972 la verkon de la ĉeĥa klasikulo V. K. Klicpera (1792-1859) *Komedio en lavtrog*, kiun tradukis L. Špína. Tekstojn de la kantoj esperantigis J. Kořínek.

Turismo

- La hungara vojaĝoficejo "Volanturist" organizas ĉi-jare la 10an jubilean Internacian Turistan Renkontiĝon-Festivalon kun la devizo "Esperanto – lingvo de la internacia turismo". Aŭspicias la Festivalon i.a. Asocio Monda Esperanto-Turismo. Milojn da partoprenantoj atendas la organizanto "Volanturist" (Szivárvány str. 29, Szeged, Hungarujo).
- Je la fino de 1971 Bulgara Esperanto-Asocio subskribis protokolon pri kunlaboro kun la Komitato de Turismo ĉe la Ministra Konsilantaro de Bulgarujo. En ĝi estas antaŭvidita eldonado de turismaj prospektoj kaj broŝuroj en Esperanto. La komitato jam aperigis la unuan 36-paĝan luksan, multkoloran broŝuron "Turisma Bulgario". Tiu ĉi broŝuro, enhavanta multe da informoj necesaj al turisto, aperis en 20000 ekzempleroj. La kvanto sufiĉe klare montras la pozitivan sintenon de ĉi tiu ŝtata turisma instanco al Esperanto. Alia rekono de la valoro de la Internacia Lingvo estas presigo de turismaj Esperanto-adresoj en la rubriko "Utilaj adresoj". Asocio Monda Esperanto-Turismo (Poŝtokesto 45, Sofio-C, Bulgarujo) sendas la broŝuron kontraŭ pago de la afranko: unu respondkupono.

IOM PRI STILO KAJ KONSTRUO DE LA FRAZO EN ESPERANTO (daŭrigo)

En Esperanto oni kutime metas la adjektivon tuj antaŭ aŭ tuj post la substantivo, al kiu ĝi rilatas. Se estas pli ol unu adjektivo oni povas laŭplaĉe meti ilin kaj antaŭ kaj post la koncerna substantivo. Ekzemploj: *Mia fianĉino havas belajn, bluajn okulojn kaj longajn harojn blondajn. Ni estas membroj de granda organizaĵo internacia.*

Por la klareco de la stilo ne estas rekomendinde meti tutajn frazo-partojn inter la adjektivo kaj la substantivo. Tamen oni sufiĉe ofte legas en Esperanto-periodaĵoj tekstojn, en kiuj tiaj, iom neklaraj, frazo-konstruoj abundas.

Jen kelkaj ekzemploj, arbitre ĉerpitaj el pluraj Esperanto-revuoj:

Pli klara estas:

La estonteco de nia asocio troviĝas en la manoj de junaj, plenaj de entuziasmo aktivuloj.

La gazetaro raportis pri la nelojalaj, intence elpensitaj de la eksterlanda konkurenco atakoj.

Oni tenis en malliberejo la minacatan per mortkondamno kuraĝan batalanton.

... troviĝas en la manoj de junaj aktivuloj, plenaj de entuziasmo.

... pri la nelojalaj atakoj, intence elpensitaj de la eksterlanda konkurenco.

Oni tenis en malliberejo la kuraĝan batalanton minacatan per mortkondamno.

Kvankam gramatike korektaj, oni prefere ne formulu frazojn, kiujn oni devas unue analizi vorton post vorto antaŭ ol ekkompreni ilian sencon. Mi iam ricevis leteron, kiu komenciĝas jene: *La de vi per via letero de la 6a de la nuna monato donitajn klarigojn mi ricevis bonorde.* Kiom multe pli klara fariĝas tiu frazo en jena vorto-ordo: *Bonorde mi ricevis la klarigojn, kiujn vi donis al mi per via letero de la 6a de*

la nuna monato.

Precipe ĝerman-lingvanoj emas uzi abunde la pasivajn verboformojn laŭ la kutimoj de siaj naciaj lingvoj. Sed la pasivaj tempoj ofte igas la stilon iom peza, malflua kaj "grasa". Preskaŭ ĉiam estas eble eviti ilin per simpla "aktivigo" de la frazo. Vi ja ne dirus "Estas frapate al la pordo" sed "Oni frapas je la pordo" aŭ "Oni frapas la pordon".



VOJO kaj TEMPO

BELARTAJ KONKURSOJ 1967

Originala poezio: 3a premio

*Tagoj trafalas en futuron,
ŝrumpas je guto sapvezik',
forviŝas tempo la konturon
de mensa bild' per tuĉpenik'.*

*Kavvojon en arbar' mi iras,
kvardek' da jaroj pasis for . . .
Humidon saman mi enspiras
kiel en griza rememor'.*

*La ĝuoj de la juna aĝo,
la elreviĝoj de la viv'
skribitaj jam sur flava paĝo
forkapriolis sur dekliv'.*

*Ŝvebis for kelka revo mia,
min eble mi ne perdis mem,
nun ĉio ŝajnas tutalia,
eĉ arto rolas sen kompren'.*




La aŭtoro: Jiří Kořínek
(Ĉeĥoslovakujo)

*En ŝel' betula nigro fenda,
sur rok' sidiĝis papili' . . .
Ĝi estis viv' kaj mi ne plendas,
ĉar tian ĉi meritis mi.*

*Ĝoj' kaj sufero en alterno —
malnovas jam ĝis banalec'.
Vojon kondukan al eterno
mi paŝas jam ĉe lasta pec'.*

*Tiam ĝi estis voj' promesa
de dudek jaroj de junul',
nun certas post jardeko sesa:
celon maltrafis mia kur'.*



Sed, en la decida momento la ĉevalo abrupte ...

NIAJ KARAJ ETULOJ

Jam kelkajn fojojn sinjorino Modero rimarkis, ke ŝia sesjara filineto Anjo havas la kutimon konigi sin al novaj amikinoj per la diro: "Mi estas la filino de doktoro Modero".

Unu tagon la sinjorino decidis korekti sian infanon. Kiel zorgema patrino, ŝi konsilis al sia filino, ke estonte ŝi simple diru sian nomon sen iu aludo pri la doktoreco de sia patro, ĉar tio povus vekti impreson de *snobeco* aŭ *afektado*. "Nomu vin tutsimple Anjo" — la patrino admonis kun iom da emfazo en la voĉo.

Post kelkaj tagoj kolego de doktoro Modero venis viziti la familion. Anjo malfermis al li la pordon kaj la sinjoro demandis: "Bonan tagon, ĉarma fraŭlineto! Vi estas *tutcerte* la filineto de doktoro Modero?" "Ne," — diris Anjo — "ĝis antaŭ kelkaj tagoj ankaŭ mi kredis tion, sed mia patrino diris al mi, ke ne."

RAJDA LECIONO

Anĝela antaŭ nelonge fariĝis membrino de klubo de ĉeval-rajdantoj. Post kelkaj lecionoj ŝi klopodis, surdorse de sia ĉevalino, transsalti obstaklon. Sed, en la decida momento la ĉevalo abrupte ekhaltis antaŭ la barilo, tiel ke Anĝela, en gracia arko, flugis trans la heĝon.

Kuraĝige ŝia rajdo-instruisto vokis: "Ne malbona salto, sed proksiman fojon vi klopodu *kunsaltigi* la ĉevalon."

Klarigoj:

snob-o: persono, kiu fanfarone imitas ĉion, kio estas laŭmoda.

afekt-i: konduti nenature, nesimple. (Lia afektado ne sukcesis imponi la publikon = Liaj nenaturaj, artefaritaj manieroj ne sukcesis imponi la publikon)

tut-cert-e: tute certe. En Esperanto oni ofte renkontas tiajn kunmetaĵojn: adverbo + adverbo, aŭ adverbo + adjektivo. (Komparu: tutsimple, tutkore, tuttage, tutanima, tutkora ktp.)

kun-salt-ig-i: Vi klopodu kunsaltigi la ĉevalon = Vi klopodu igi la ĉevalon salti kune kun vi (salti = netransitiva verbo, do: la ĉevalo saltas, la ĉevalo kunsaltas, sed, por igi ĝin transitiva, vi kompletigu ĝin per la sufikso "-ig-". Mi saltigas la ĉevalon trans la heĝon.).

TIO POVAS OKAZI

Dum agrabla akcepto du viroj, ne konantaj unu la alian, komencis konversacion.

"Rigardu tiun virinon," — ekdiris unu el la du — "ŝi kriaĉas senĉese, ŝia nazo estas kvazaŭ terpomo, ŝia buŝo similas al preĝeja pordego kaj ŝiaj kruroj havas la formon de pilieroj de ponto. Kiu ŝi estas?"

"Estas mia edzino."

"Aĥ, pardonu, mi tre bedaŭras..."

"Se vi nur scius, kiom mi bedaŭras!"

Ĉu ni eksperimentu?

Unu el miaj amikoj, bibliotekisto, iam konfidis al mi, ke li havas ardan deziron lerni la francan lingvon. Li estis preskaŭ tute forgesinta la unu-jaran instruadon en tiu lingvo, kiun li ricevis en la lernejo.

Post kelka tempo mi vidis en la loka programo pri la komunuma vesperlerneja instruado, ke li estis enskribita kiel instruisto de la franca por komencantoj. Iomete mirante mi memorigis lin pri lia eldiro, ke li deziras lerni la francan lingvon. "Jes", li respondis, "tiun mi lernos per la instruado."

Kiam mi poste demandis kelkajn el liaj lernantoj pri la rezulto de la instruado, ili respondis, ke ili estas absolute kontentaj, kvankam ili rapide eltrovis, ke liaj propraj francaj scioj ne estas profundaj. La bibliotekisto scipovis aranĝi interesan formon de gruplaboro, kiun la multaj ĉambroj de la biblioteko ebligis. Ĉi tion mi ekmemoris, kiam mi en cirkulereto de s-ro G. van Dijk legis jenan aserton:

"La enkonduko de Esperanto estas ebla tuj, sen temporaba preparado. Pro ĝia logika strukturo, facila prononcado, fonetika skribmaniero kaj internacia vort-

M. CHRISTOFFERSEN

radikaro ĉiu lingvosperta instruisto povas komenci instruadon de Esperanto jam post preparaj studoj de nur kelkaj semajnoj."

Ĉi tiun eldiron mi citis en letero, de kiu unu el la gvidaj danaj esperantistoj, s-ro P.V. Bagger, ricevis kopion. La reago venis en la formo de jena letero:

"Via kopio donas al mi okazon kontraŭi la opinion, ke oni post kelkaj semajnoj povas instrui Esperanton. Tio ne nur ne estas ĝusta, sed ĉe homoj, kiuj scias pri fremdaj lingvoj, tio firmigus la opinion, ke Esperanto estas neserioza fako. Ke de tempo al tempo nekvalifikitaj instruistoj "instruas" Esperanton, tio eble ne tiom gravas, sed mi volas tre forte averti kontraŭ publika eldiro de nia flanko kun la de vi proponita enhavo. Tio estus rekte malutila."

Ĉi tie do aserto kontraŭas aserton. Unuflanke sendube estas prave, ke estus malfavore, ke persono, kiu ne havas lingvan kaj instruan edukon, funkcias kiel Esperanto-instruisto. Aliflanke granda intereso en rilato al la informado inter instruistoj estas ligita al la demando: ĉu klera lingvoinstruisto rajtas entrepreni Esperanto-instruadon, eĉ se li mem ankoraŭ estas nur komencanto?

Estus interese starigi eksperimentan instruadon en kelkaj klasoj kaj poste legi raporton ĉi tie en la revuo *Esperanto* por anstataŭigi asertojn per konstatoj.



57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon, Usono.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

99 dolaroj por 21 tagoj

Por ne-usonaj vizitantoj al Usono, la konata aŭtobusa kompanio Greyhound vendas biletojn por 99 dolaroj, kiujn oni povas uzi laŭvole sur la tuta teritorio de Usono dum 21 tagoj. Por ĉiu plia monato aldoniĝas 33 dolaroj ĝis maksimumo de 3 monatoj. Grave: oni nepre devas aĉeti la bileton en sia hejmlando, ĉar ne eblas en Usono. Informas ĉiu vojaĝoficejo.

Infanoj prizorgotaj

Kvankam ne povos okazi la Internacia Infankongreso, la Loka Kongresa Komitato klopodos fari specialajn aranĝojn por la infanoj neformale. Oni dividos la infanojn laŭ aĝo-grupoj kaj prizorgos ilin kompetente. Pliajn informojn donas s-ro Larry McLaughlin, vicprezidanto LKK, 3611 S.W. Condor, Portland, Oregon 97201, Usono.

ĈIAM PLI KONCIZE

Kiu estas la plej mallonga frazo (sencohava), kiu enhavas ĉiujn literojn de la Esperanta alfabeto? Tiun demandon ni starigis en la oktobra numero de "Esperanto", 1971 (p. 168). Reage venis pluraj proponoj, ĉiuj laŭŝajne inspiritaj de muzikemo aŭ religio. Jen, laŭ ordo de longeco, la proponoj ricevataj:

La hideca geĵso preĝe ĵuris abstini kvazaŭ ĉefmonaĥo (45 literoj, M. Halvelik, Belgujo).

Laŭ deca poŝtaĵo, zamenhofaj basvoĉoj eĥis kuraĝige (44 literoj, Ŝibajama ĝun-iĉi, Japanujo).

Eĉ ĵaluza Budho ŝprucigis akvon: laŭteĥu fi-ĝemoj (41 literoj, W.A. Rowe, Britujo).

Place knabĥoro hezitvoĉe aŭdigis fuŝmuĝaĵojn (40 literoj) kaj *Gajecvoĉa fuŝmuĝaĵo de knabĥoro halt-paŭzis* (38 literoj, ambaŭ Jamasaki Motohiro, Japanujo).

Nu, kun plena admiro al la cerbostreĉintoj, la redakcio tamen kuraĝas opinii, ke tiuj frazoj neniam fariĝos perloj de nia literaturo. Sed eble vanĉe ni rompas al ni la kapon? Kiel prave atentigis d-ro A. Albault (Francujo), por kontrolo de skribmaŝina literaro tute sufiĉas frazo, en kiu troviĝas po unu fojon la supersignoj — eventuale en majuskla kaj minuskla formoj. Ĉar majuskla Ŭ apenaŭ necesas, sufiĉas majuskla kaj minuskla cirkumflekso kaj minuskla hoko. Ekzemple: *Ĉefgvidanto ĵaluzas pri homa laŭdbleko* (34 literoj). Sed certe troviĝos leganto, kiu elpensos pli elegantan, pli koncizan kaj pli memorindan frazon...

Esperanto-poŝtmarko en Usono?

Dank' al klopodoj de individuaj esperantistoj, la usona instanco, kies tasko estas decidi pri eldono de poŝtmarkoj, nuntempe konsideras la proponon pri speciala poŝtmarko okaze de la 57-a UK de Esperanto. La uzo de okaza poŝta stampilo estas jam konsentita de la poŝtaj aŭtoritatoj.

Landa kongreso de ELNA

Paralele kun la UK okazos la 20-a kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kiu estas la landa asocio de UEA por Usono. Tiu ĉi kongreso, same kiel la Konferenco de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), okazos en la kongresejo Hilton, 921 S.W. Sixth Avenue, Portland, Oregon 97204.

Kongresa Libro 1972

La Kongresa Libro 1972 estos presita en Usono. Por kongresanoj el ekster Usono la LKK konservos ekzempleron en la kongresa dokumentujo. Tiuj kongresanoj ricevos aerpoŝte nur la programan kajeron ĉe sia hejma adreso, se ne venos de ili aparta instrukcio. Tiun ĉi aranĝon necesigas daŭraj strikoj en la havenoj de Usono kaj la tre altaj afranko-kostoj de la aerpoŝta sendo.

Kunvenoj de specialistoj

Praktikan aplikon de la Internacia Lingvo en diversaj fakoj evidentigos kunvenoj de 20 fakaj organizaĵoj enkadre de la 57-a UK. Interalie renkontiĝos la instruistoj, medicinistoj, radioamatoroj, religianoj, skoltoj kaj akademianoj.

Statistiko (je 22 februaro 1972)

Argentino 2, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 2, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 19, Bulgarujo 10, Ĉeĥoslovakio 4, Danlando 5, Egiptujo 5, Finnlando 14, Francujo 34, F.R. Germanujo 28, Grekujo 4, Hispanujo 12, Hungarujo 5, Israelo 1, Italujo 24, Japanujo 22, Jugoslavio 7, Kanado 28, D.R. Kongo 2, Koreujo 6, Madagaskaro 1, Meksiko 9, Nederlando 37, Norvegujo 8, Nov-Zelando 4, Peruo 1, Pollando 6, Portugalujo 3, Rumanujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 25, Svislando 9, Usono 215, Venezuelo 1.

Entute 572 aliĝintoj el 37 landoj.

LA INTERNACIA KARAVANO DE UEA AL PORTLAND

Forflugo el Amsterdam: 26 julio 1972 tagmeze. Reveno en Amsterdam: 18 aŭgusto 1972 frumatene. Prezo, nur por la vojaĝo tien-reen: 980,— gld. Kvankam la tempo jam tre urĝas, ankoraŭ estas ebleco aliĝi al la karavano. **Jen du gravaj informoj:**

1. **La reveno estas ankoraŭ plifruigita je unu tago.** Tio signifas, ke oni alteriĝos sur la amsterdama flughaveno vendredon (18 aŭgusto) matene.

2. Pro difinitaj cirkonstancoj la reveturo okazos **definitive ekde Portland**. Komuna reveturo el San Francisco kun kelktaga restado en bela loko survoje por tiuj, kiuj tion deziras, estas preparata. Ĉiuj aliĝintoj ricevos cirkuleran leteron kun ĉiuj necesaj pliaj detaloj.

Aliĝojn kaj informpetojn oni direktu al: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, II R, Rotterdam 3002. (Tel. 010-364542.)



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F 75 Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1971, Dua Parto, p. 311. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

Dimanĉe

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Rádio Clúbe de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.15-12.25 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), 13.90 m (21585 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Merkrede

12.15-12.25 Bern, kiel lunde. (s-ro Gacond.)

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvon merkredon.)

20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kcs). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

20.00-20.15 Sabadell, 89.1 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la merkreda programo.

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (d-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63 Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 47 m, 45 m, 31 m, 25 m.

21.40-22.00 Tallinn, 290 m (1034 kcs), 49.30 m (6085 kcs). I. Eesti Raadio, Esperanto, Poŝtokesto 402, Tallinn, Sovetunio. (Nur la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.)

23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 25 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj" dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 16.30 ĝis 17.00 h per ondoj 49.71 m (6035 kcs), 42.11 m (7125 kcs), kaj de 21.00 ĝis 21.30 h per ondoj 49.71 m (6035 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 31.45 m (9540 kcs). La anguletoj estas 4-minutaj, okazas ĉe la fino de la duonhora elsendo kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell, Sorocaba;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Gdańsk (escepte de 66.29 Mcs), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Tallinn, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdbla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.28 m, 25.60 m, 25.28 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m, 13.90 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj kondiĉoj diversspecaj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 455, 1 marto 1972

UK 1974

La Estraro de UEA akceptis inviton de Hamburga Esperanto-Societo okazigi la 59-an Universalan Kongreson de Esperanto en Hamburgo je la periodo de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974.

OFICIALA POSTKONGRESO 1973

Laŭ invito de Helena Esperanto-Asocio, la oficiala postkongreso de la 58-a UK (Beograd) okazos en Ateno, Grekujo.

MAGNETOFONA SERVO EN 1971

Laŭ la jarraporto de la Magnetofona Servo (komisiito: s-ro R. Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ont., Kanado), dum la jaro 1971 estis 17 mendoj (entute 121 programoj) el 8 landoj. Por tiuj mendoj necesis 70 horoj da kopiado. La Servo atendas ankoraŭ pli multajn mendojn.

LA MEMBRARO EN 1971

— Laŭlanda statistiko

Lando	Individuaj Membroj	Asociaj Membroj	Entute
Albanujo	1	—	1
Alĝerio	2	—	2
Angolo	1	—	1
Argentino	34	250	284
Aŭstralio	137	214	351
Aŭstrujo	92	300	392
Belgujo	145	500	645
Brazilo	233	125	358
Britujo	581	800	1381
Bulgarujo	104	5100	5204
Cejlono	5	—	5
Centra Afrika Resp.	2	—	2
Ĉeĥoslovakujo	164	1100	1264
Ĉilio	2	—	2
Ĉinujo	8	—	8
Danlando	171	900	1071
Egiptujo	7	—	7
Etiopujo	2	—	2
Filipinoj	1	—	1
Finnlando	257	200	457
Francujo	623	796	1419
Gano	3	—	3
Germana Dem. Resp.	20	—	20
Germanujo, F.R.	495	1200	1695
Grekujo	35	326	361
Gvineo	1	—	1
Hindujo	11	—	11
Hispanujo	217	392	609
Honduro	1	—	1
Honkongo	2	—	2
Hungarujo	101	3100	3201
Indonezio	7	—	7
Irako	1	—	1

Lando	Individuaj Membroj	Asociaj Membroj	Entute
Irano	2	—	2
Irlando	12	15	27
Islando	17	—	17
Israelo	38	200	238
Italujo	286	1000	1286
Japanujo	283	1000	1283
Jugoslavio	189	1500	1689
Kanado	99	161	260
Kenjo	1	—	1
Kipro	1	—	1
Kolombio	10	—	10
Kongo, Dem. Resp.	6	19	25
Koreujo	30	150	180
Kostariko	2	—	2
Kubo	7	—	7
Libano	1	—	1
Liĥtenŝtejno	1	—	1
Luksemburgo	3	—	3
Madagaskaro	4	—	4
Malio	2	—	2
Malto	2	—	2
Maroko	1	—	1
Meksiko	26	—	26
Monako	3	32	35
Mongolujo	3	—	3
Mozambiko	2	—	2
Ned. Antiloj	1	—	1
Nederlando	475	736	1211
Nigerio	1	—	1
Norvegujo	94	430	524
Novaj Hebridoj	1	—	1
Nov-Gvineo	1	—	1
Nov-Zelando	107	205	312
Pakistano	1	—	1
Peruo	8	—	8
Pollando	273	3050	3323
Portugalujo	30	—	30
Reunio	1	—	1
Rodezio	4	—	4
Rumanujo	43	—	43
Senegalio	2	—	2
Singapuro	1	—	1
Sovetunio	120	—	120
Sudafriko	33	20	53
Sudano	1	—	1
Svedujo	537	1000	1537
Svislando	204	120	324
Tajlando	1	—	1
Tanzanio	3	—	3
Tunisie	2	—	2
Turkujo	1	—	1
Urugvajo	7	25	32
Usono	552	82	634
Venezuelo	9	—	9
Vjetnamujo	12	—	12
88 landoj	7022	25048	32070

o o o o o o

Redakcia noto: Pro la spaco-manko, la kutimaj informoj pri donacoj, membroj-subtenantoj ktp. estas prokrastitaj ĝis la venonta numero.


Kreado de Sciencia Tradukservo de UEA

En *Esperanto*, n-ro 784 (marto 1971), p. 44-45, A. Gončarov tre bone pritraktis la neceson esperantigi sciencajn artikolojn kaj krei Sciencan Tradukservon ĉe UEA. Post la artikolo mem, la direktoro de la Centra Oficejo, d-ro V. Sadler, alvokis volontulon por administrado de tiu servo. Respondis A. Heck, asististo en la Universitato de Liège (Instituto pri Astrofiziko) kaj belga delegito de Internacia Sciencia Asocio Esperantista (ISAE).

Post principa aprobo de la Estraro de UEA, estis interkonsentite plani jene la starigon de tiu Sciencia Tradukservo:

1. Ĝis la fino de 1974, estigo de sliparo pri:
 - a) ekzistantaj tradukitaj artikoloj,
 - b) personoj akceptintaj traduki artikolojn.
2. Komence de 1975, ekfunkciado de la Servo laŭ jena procedo:
 - a) planita tradukado de artikoloj (instigado ekz. per publikigado en *Sciencia revuo*);
 - b) sekve al tradukpeto:
 - 1) serĉo inter ekzistantaj tradukoj,
 - 2) kaze de netrovado inter ili, peto pri tradukado al iu konvena persono en la sliparo,

S-ro André Heck,
25-jara
sciencisto,
pretas labori
por la
sciencia
kampo de la
movado
komforme al
la bezono de
la nuntempo.



3) se ne ekzistas tia persono, serĉo de tia persono per la delegita reto de UEA kaj ISAE

c) la servo financos sin mem; la uzantoj pagos la bezonitajn kostojn (kiuj varios laŭ la artikolo: longeco, fotoj, desegnaĵoj ktp.)

Ni petas do ĉiun personon, kiu konas sciencajn tradukitajn artikolojn en Esperanto, konigi ilin al la Sciencia Tradukservo (adreso ĉi-sube) kun kompletaj bibliografiaj indikoj kaj se eble havigi al la Servo ekzempleron aŭ fotokopion de tiaj artikoloj. Aliflanke ĉiuj personoj, kiuj pretas kunlaboradi kun la Servo, t.e. sekve al peto traduki artikolon, povas sin anonci kun indikoj de nomo, kompleta adreso, fako, grado de instruiteco, lingvoj tre bone konataj. Tutkoran antaŭdankon.

André Heck
Sciencia Tradukservo de UEA
(rue du Chéra 49, B-4000 Liège, Belgujo)

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

— sub aŭspicio de UEA

B U D A P E S T
17 -23 julio 1972



Kulturaj programoj:

- *Prezento de la hungara literaturo, poezio kaj prozo*
- *La hungara muziko*
- *Kanto kaj ĥoroj*
- *Folklor-prezentado*
- *Filmoprezentadoj*

Aliĝantoj rajtas:

- *Partopreni la programerojn de la Festivalo*
- *En la jaro 1972 ricevas senpage la revuon "Hungara Vivo"*
- *Rajtas uzi la servojn de la Festivalo (loĝiga, ekskursaj kaj aliaj servoj)*

Aliĝkotizo: 30,— nederlandaj guldenoj.

Detalan informon petu de la organizanto:

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO, Budapest 5, Poŝtfako 193.



Kun tiuj, kiuj
ŝatas pentri
sovaĝajn
bestojn,
deziras konatiĝi
33-jara fraŭlo
— pentristo —
s-ro Simeon
Mirčev Paunov
(kv. Rudničar-437,
Pernik, Bulgarujo).

ANONCETOJ

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,45 gld. (t.e. 1 internacia respondkupon). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

Vegetara domo — diverslingva biblioteko. Eblas trankviliĝi, manĝi, ripozi ktp. Erna Ben-Haim, Gordonstr., Tiberias, Israelo. Tel. 20103.

Ferio kun sendo. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu semajnon (1972 07 22-29) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Kopenhago F., Danlando.

Mi deziras gekorespondamikojn el la tuta mondo. Skribu al f-ino Aino Seppälä, SF-97140 Muurola, Finnlando.

Partoprenu la kanadan kongreson de Esperanto en Victoria de la 24a ĝis la 26a de julio. Karavane al Portlando. Informoj: K.K. de Esperanto, 1712 Haultain, Victoria, B.C., Kanado.

Facile atingebla de Eŭropo estas la apudmara, sudangluja feriejo Hastings, Sussex, kie en bona, komforta gastdomo "Croft House", The Croft, esperantistoj ĉiujare libertempas. Suferantoj je diabeto ankaŭ bonvenaj.

Pakistananoj deziras korespondi internacie kaj sopiras al Esperantaj libroj. Helpon atendas d-ro Safdar Khan, Geologia Fakolito, Universitato de Peshawar, Pakistano.

Deziras korespondi komence itallingve, poste en Esperanto, kun samaĝuloj, 13-jara Giuseppe Rossi, Via Cortina, Cordenons PN, Italujo.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

Semajno de Internacia Amikeco: Pri la aranĝoj dum kaj por tiu Semajno oni informu s-ron Carlén, komisiiton por Semajno de Internacia Amikeco (adreso: Yxhult, S-690 60 Hällabrottet, Svedujo).

Se vi posedas magnetofonon kaj studadas la anglan lingvon, donu kaj ricevu lingvajhelpon per dulingva (la via/angla) sonbendinterŝanĝo. Senpage aldonu vian nomon al nia 1972a Adresaro. Nepre klopodu ekinteresi la neesperantistajn lingvointeresatojn pri la internacia lingvo! Detalojn pri via magnetofono, ŝatataj temoj ktp. akceptos: Speedac, 3 Bouverie Road West, Folkestone, Kent, Anglujo.

24-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, 6-an ĝis 12-a de majo 1972 en Lugano (Sud-Svislando), Petu informojn: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco.

Letervespero en majo: Esperante oni diras: "Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto"; en Francujo: "Ne kredu, ke koturnoj falas en vian buŝon tutprete rostitaj". Kiel oni diras ĉe vi? Skribu al Esperanto-grupo, 5 rue Docteur Roux, F-34-Montpellier, Francujo.


Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

KOREKTO

En la marta *Esperanto*, sur p. 48, en la citaĵo de José Ortega y Gasset enŝteliĝis eraro: la vorton "societo" bonvolu korekti al "socio".



Nun reaperis du el la plej gravaj romanoj
origine verkitaj en Esperanto
kune en unu bindo!

- Produktitaj surbaze de la hungaraj originaloj
- Fortika bindo kun plasta kovrilo
- Intervorto de Marjorie Boulton
- 504 paĝoj da streĉa legaĵo
- Prezo nur 60,- d.kr. (= 30,- gld.)



Mendebla ĉe UEA.

Eldonejo TK
Hjortespringparken 60
DK-2730 Herlev

Dana poŝtĉekkonto 7 95 58
Germana " Hamburg 36 17
Nederlanda " 1806731

LAŬTEMA VORTARO

Esperanto — Angla — Franca — Hispana

27200 vortoj en 4 lingvoj.

90 temoj, 234 paĝoj,

17 x 12 cm.

Prezo: 3 usonaj dolaroj


(Pagoj al Buenos Aires)

Prof. Adan Hryniewicz,
C.C. 3134, Correo Central,
BUENOS AIRES
(Argentino)



LA GLUMARKO DE LA JARO

1972



Internacia
Libro - Jaro

Bela dukolora (verda-nigra) marko por la
Internacia Libro-Jaro, proklamita de Unesko.

Prezo: po 0,40 gld. (por Nederlando 0,46)
por folio de 16 markoj. Sendokostoj 10%.

LIBROSERVO DE UEA

Kristalojn

Mineralojn

Ĉiuspecajn el la tuta mondo mi deziras aĉeti daŭre.
Aŭ rekte el minejoj aŭ tutaj kolektoj.

Skribu al: Harry Borchert (Mineraloj), D-3392 Clausthal-
Zellerfeld, Adolf Römerstr. 17, F. R. Germanujo.

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi ideoj,
estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni
Casella postale 159, I-13051 Biella, Italujo

HELSINGÖR 1972

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos en la
internacia Altlernejo de Helsingör (tute moderna)
dum la semajno **23-30 de julio** (tuj antaŭ Frosta-
vallen). Venu por ĝui vere interesan ferio-semajnon
inter samideanoj el multaj landoj!

Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

MUZIKA LEKSIKONO

kaj

Suplementa Versio: Esperanto-Itala

Aŭtoro: Johano Baptisto BRIANO

(Verko-prezento de d-ro Aldo Schmuckher)

*1 000 italaj muzikfakaj terminoj amplekse esperantlingve
difinitaj faras la verkon vere enciklopedieto*

100 paĝoj. Formato 21 x 15 cm. Prezo: 1 500 italaj liroj.

Ekskluziva vendo ĉe: C.E.K.I.T., I-20143 Milano (Italio),
Via Villoresi 38

S

OMERAJ

U

NIVERSITATAJ

K

URSOJ

72

en la UNIVERSITATO de LIÈGE (BELGUJO)

SART TILMAN kvartalo

30.7 – 27.8.1972

kurstemoj:

A. LINGVISTIKO

- esperantologio
- fonetiko
- ĝenerala lingvistiko
- interlingvistiko
- komputera lingvistiko
- matematikaj metodoj en lingvistiko

B. MEDICINAJ SCIENCOJ

- anatomio de la homa korpo
- biologio
- fiziologio de la homa korpo
- histologio
- kompara anatomio
- oftalmologio

lekciistoj:

W. De Smet Belgujo
R. Haupenthal F. R. Germanujo
S. Kato Japanujo
H. D. Maas F. R. Germanujo
T. Nakayama Japanujo
C. Støp-Bowitz Norvegujo
I. Szerdahelyi Hungarujo
J. Wells Britujo

honorkomitatanoj:

P. Struye Prezidanto de la belga Senato
A. Van Acker Prezidanto de la belga Ĉambro de la Deputitoj
C. Hanin Ministro de la Franclingva Kulturo
F. van Mechelen Ministro de la Nederlandlingva Kulturo
L. Hurez Ministro de la Nacia Edukado (franclingva parto)
W. Claes Ministro de la Nacia Edukado (nederlandlingva parto)
J. Rostand de la Franca Akademio
kaj aliaj politikaj, universitataj, lokaj kaj esperantistaj eminentuloj

*informojn,
stipendiojn,
aliĝilojn,*

petu ĉe:

S.U.K. – 72
Boîte Postale 9
B-4000 Liège 3
(Belgujo)

ALIĜU FRUE POR GARANTII VIAN LOĜADON !!!